

40 PRI LIRIKA ŜTELISTO

„Iam ĝi aspektas tute alie," aŭdiĝis post laŭdeca silento sinjoro Zah, redaktoro. „Ofte oni vere ne scias, ĉu ĝi estas malbona konscienco, aŭ plivere fanfaronemo kaj afektemo; ĉefe la profesiaj krimuloj eble krevus, se iam ili ne povus sin glori pro ia faritaĵo. Mi opinias, ke pluraj krimuloj formortus, se la socio ignorus ilin; fakan deliktulon kvazaŭ varmigas la escepta publika atento, kiun li ĝuas. Mi ne diras, ke homoj ŝtelas kaj rabas nur pro la gloro; ili tion faras pro mono aŭ facilanimeco aŭ sub influo de malbonaj amikoj; sed kiam ili foje alflaris al aura popularis, vekigis en ili ia megalomanio - same egale kiel ĉe politikumistoj aŭ entute publike agantaj personoj.

Atendu, pasis jam pluraj jaroj, kiam mi redaktis nian bonegan regionan semajnan gazeton Kuriero de l' Oriento. Nome mi naskiĝis en okcidento, sed vi ne kredus, kun kia vervo mi batalis por regionaj interesoj de orienta Bohemio. Ĝi estas milda montetaro, kiel pentraĵo, kun prunaleoj, kaj lirlantaj riveretoj; sed mi alarmis ĉiusemajne nian harditan montaran popolon, krude batalantan por peco da pano kontraŭ la malmilda naturo kaj malfavoro de la registaro, sinjoroj, tiel bele kaj sincere mi skribis; nur du jarojn mi aktivis tie, sed dum la du jaroj mi inokulis al tieaj loĝantoj konvinkon, ke ili estas harditaj montaranoj, ke ilia vivo estas heroa kaj peniga, ke ilia regiono estas malriĉa, sed melankolie bela kaj montriĉa - mi opinias, ĵurnalisto ne povas fari pli multe, ol elserĉi el regiono de Čáslav ion similan al Norvegio. El tio videblas, kiajn grandajn taskojn kapablas plenumi gazetoj. Vi scias, regiona redaktoro ĉefe devas atenti lokajn eventojn.

Foje haltigis min tiea polica komisaro kaj diras: Jen, hodiaŭ nokte elrabis ia mizerulo butikon de sinjoro Vaŝata, komercejon kun nutraĵoj;

40 O LYRICKÉM ZLODĚJI

„Ono to někdy vypadá jinak," ozval se po náležitém mlčení pan Zach, redaktor. „Kolikrát člověk opravdu neví, je-li to špatné svědomí nebo spíš taková chlubitost a okázalost; hlavně tihle zločinci z povolání by snad praskli, kdyby se nemohli sem tam holedbat tím, co provedli. Já myslím, že by mnoho zločinců vymřelo, kdyby je společnost ignorovala; takového odborného pachatele zrovna hřeje ta výjimečná veřejná pozornost, které se těší. Já neříkám, že lidé kradou a loupi jen pro tu slávu; dělají to pro peníze nebo z lehkomyšlnosti nebo vlivem špatných přátel, ale jak jednou čuchnou k té aura popularis, probudí se v nich takové jakési velikášství - to máte stejné jako u těch politikářů a vůbec veřejně činných osob.

Počkejte, tomu už je řada let, co jsem redigoval náš výborný krajinský týdeník Posla východu. Já jsem se sice narodil na západě, ale to byste nevěřili, s jakým zápalem jsem bojoval za regionální zájmy východních Čech. Ona to je taková mírná pahorkatina, jako by ji vymaloval, se švestkovými alejemi a tichými potůčky; ale já jsem týdně burcoval náš drsný horácký lid, tvrdě zápasící o skývu chleba s nehostinnou přírodou a nepřízní vlády - páni, to se vám tak krásně a od srdce psalo; jenom dvě léta jsem tam působil, ale za ta dvě léta jsem vštípil tamnímu lidu přesvědčení, že jsou drsní horalové, že jejich život je hrdinný a krušný, že jejich kraj je chudobný sice, ale melancholicky krásný a hornatý, - já myslím, víc novinář nemůže udělat než vykouzlit na Čáslavsku jakýsi druh Norska. Z toho je tak vidět, jakých velikých úkolů jsou noviny schopny. To víte, takový krajinský redaktor musí hlavně dbát o lokální události.

Jednou mě tedy zastavil tamní policejní komisař a povídá: Tak dneska v noci vyloupil nějaký všivák krám pana Vašaty, co je obchod se smíšeným zbožím;

kaj kion vi diras al tio, sinjoro redaktoro, tiu fiulo verkis tie kaj postlasis poemon sur la butiktablo; tio ja estas aroganteco, ĉu?

Montru al mi la poemon, mi rapidis diri, jen io por la Kuriero; vi vidis, ke helpe de preso ni kaptos la friponon. Krome, sinjoro, konsideru nur, kia sensacio ĝi estos por nia urbo kaj la tuta regiono!

Koncize, la poemon mi ricevis post multa persvado kaj publicis en la Kuriero de l' Oriento. Mi diros ĝin al vi, laŭ tio, kiom mi ankoraŭ memoras; ĝi tekstis iel simile:

Unu, du, tri, kvar, kvin kaj la sesa, sep, ok, naŭ, dek kaj la dek unua, horo noktomeza batas, hor' konvena por ŝtelisto trotras. Pardon kiam mi breĉis, iu sur la strato paŝis, ne estus mi ŝtelist' timante, sed paŝoj pasis plu perdiĝante, se homo en mallum' aŭskultas, martelas la kor' kaj batas, la kor' orfiĝis kiel mi, panjo mia, ĉesu pro mi larmi, iu havas malfeliĉon nur, sola mi estas, de muso nur susur', la mus' kaj mi, ŝtelista par', jen pro la muset' peco da pan', ĝi ne volas sin malkaŝi al mi, ŝtelist' eĉ ŝteliston devas timi. Kaj tiel ĝi daŭrigis ankoraŭ plu, ĝis je la fino estis: Povus mi verki ankoraŭ plue, sed la kandelo ne plu lumas kontinue.

Do la poemon mi publicis kun ampleksaj analizoj psikologia kaj estetika; mi emfazis ĝiajn baladajn trajtojn kaj elokvente aludis la delikatajn kordojn en la animo de krimulo. Ĝi estis siaspeca sensacio; preso de la aliaj partioj kaj de aliaj regionaj urboj asertis, ke ĝi estas aĉa kaj artifika falsaĵo; aliaj antagonistoj de la orienta Bohemio male deklaris, ke ĝi estas plagiato, misa traduko el la angla kaj multon alian.

Sed meze de mia plej bona polemikado por nia regiona ŝtelisto-poeto, venis al mi la polica komisaro kaj diras: Nu, sinjoro redaktoro, oni povus jam fini la aferon kun tiu via damna ŝtelisto;

a co byste tomu řek, pane redaktore, ten ničema tam napsal a nechal ležet na pultě báseň; to přece je drzost, no ne?

Ukažte mně tu báseň, řekl jsem honem, to bude něco pro Posla; uvidíte, že pomocí tisku toho taškáře chytíme. Mimoto, pane, jen si považte, co taková senzace bude pro naše město a pro celý kraj! Zkrátka tu báseň jsem po mnoha řečích dostal a otiskl jsem ji v Poslu východu. Já vám ji povím, pokud si ji ještě pamatuju; bylo to nějak takhle:

Jedna, dvě, tři, čtyři, pět, šest, sedum, vosum, devět, deset, jedenáct a dvanáct bije, to je hodina pro zloděje. Když jsem ty dveře páčil, někdo po ulici kráčel, to bych nebyl zloděj, kdybych se bál, ty kroky šly pořád dál a dál, když člověk v takový tmě poslouchá, slyší, jak mu srdce bouchá, to srdce je sirotek jako já, maminka by nade mnou plakala, někdo má na světě neštěstí, já jsem tu tak sám, to jen myš šelestí, myš a já, zloději voba, proto jsem jí nadrobil kus chleba, vona se nechce ukázat, kde je, zloděj se musí bát i zloděje. A tak to šlo ještě dál, až na konec bylo: Moh bych toho napsat ještě více, ale vona mně už dohořívá svíce.

Teda tu báseň jsem otiskl s obšírným rozbořem dušezpytným a krasovědným; vyzvedl jsem její baladické rysy a výmluvně poukázal na jemné struny v duši zločincově. Byla to svým způsobem senzace; tisk jiných stran a jiných krajinských měst tvrdil, že je to pustý a umělý podvrh; jiní odpůrci východních Čech zase prohlašovali, že to je plagiát, nejapný překlad z angličtiny a kdesi cosi.

Ale když jsem byl v nejlepší polemice za našeho krajinského zloděje-básníka, přišel ke mně ten policejní komisař a povídá: Tak, pane redaktore, už by s tím mohl být konec, s tím vaším zatraceným zlodějem;

konsideru, ĉisemajne denove li elŝtelis du loĝejojn kaj unu butikon kaj ĉiam postlasis sur ago-loko longan poemon!

Vere mi ĝojas, mi diris, ni enpresos ĝin! Nu, ĝi ege aĉe taŭgus, murmuris la komisaro. Sinjoro, tio estus favorado al krimuloj! Ja la ulo nun ŝtelas pro la vekita literatura ambicio! Nun vi devas tion iel stopi al li, jes? Skribu, ke la poemoj neniom valoras, ke mankas formo al ili, aŭ humoro aŭ kion vi deziras; mi opinias, ke tiu kanajlo poste ĉesos ŝteli. Hm, mi diras, tion ni ne povas skribi, laŭdinte lin jam foje; sed ni ne enpresos plu liajn poemojn kaj fino.

Bone; dum pluaj du semajnoj okazis kvin novaj ŝteloj kun konformaj poemoj, sed Kuriero de l' Oriento silentis pri ili kiel subtranĉito. Nur mi timis, ke nia ŝtelisto ne elmigru pro ofendita aŭtoro fiero al regionoj de Turnov aŭ Tábor kaj ne iĝu materialo por la tiea regiona preso; nur konsideru, kiel fierus la tieaj filistroj!

Pro la silentado estis nia ŝtelisto iel konfuzita; proksimume dum tri semajnoj estis trankvilo, sed poste la ŝteloj rekomenciĝis, nur kun tiu diferenco, ke la konformaj poemoj estis sendataj per poŝto rekte al la redakcio de Kuriero de l' Oriento. Sed Kuriero de l' Oriento obstiniĝis; parte, ĉar ĝi ne volis kolizii kun la lokaj oficoj, parte ĉar la poemoj estis ĉiam pli kaj pli malbonaj; la aŭtoro komencis ripetiĝi kaj elpensadi romantikajn trukojn kaj artifikojn; koncize, li komencis konduti kiel efektiva verkisto.

Foje nokte mi venis hejmen el gastejo; mi fajfis kiel sturno kaj ekbruligis alumeton por lumigi petrollampon. Tiumomente iu post mia dorso blovestingis la alumeton. Ne lumigi, diris obtuza voĉo. Jen estas mi. Aj, mi diris, kaj kion vi dezirus? Mi venis demandi vin, diris la obtuza voĉo, kio estas pri la poemoj.

Hometo, mi diras - ĝis nun ankoraŭ mi ne sciis, pri kio temas - nun - nun ja ne estas redakciaj horoj. Venu morgaŭ je la dek unua. Kaj vi arestigis min, diris la voĉo amare. Tio ne eblas. Kial vi ne plu enpresas miajn poemojn?

povaĝte si, tohohle týdne už zas vykradl dva byty a jeden krám, a pokaždé nechal na místě činu dlouhou báseň!

To jsem rád, já řku, otiskneme to! To by tak hrálo, bručel komisař. Pane, to je nadržování zločincům! Vždyť ten chlap teď krade jen z takové probuzené literární ctižádosti! Nyčko mu to musíte nějak zarazit, víte? Napište, že ty básně nestojí za nic, že jim chybí forma nebo nálada nebo co chcete; já myslím, že ten holomek pak přestane krást. Hm, povídám, tohle my napsat nemůžeme, když už jsme ho jednou chválili; ale víte co, nebudeme mu víc ty básně otiskovat, a je to.

Dobrá; za dalších čtrnáct dní se událo pět nových krádeží i s příslušnými básněmi, ale Posel východu o nich mlčel jako zařezaný. Jenom jsem měl strach, aby se náš zloděj z uražené autorské ješitnosti neodstěhoval na Turnovsko nebo Tábořsko a nestal se materiálem tamního krajského tisku; povaĝte si, jak by se tam ti paprikové vypínali!

Tím mlčením byl náš zloděj jaksi zmaten; asi po tři neděle byl pokoj, ale pak se začaly ty krádeže znova, jenom s tím rozdílem, že příslušné básně byly posílány poštou přímo do redakce Posla východu. Ale Posel východu se zatvrdil; jednak si to nechtěl rozházet s místními úřady, jednak ty básně byly slabší a slabší; autor se začal opakovat a vymýšlet si takové romantické hejble a ciráty; zkrátka počal se chovat jako skutečný spisovatel.

Jednou v noci jsem přišel z hospody domů; pískal jsem si jako špaček a rozškrtl sirku, abych si zapálil petrolejku. V tom okamžiku někdo za mými zády foukl do té sirky a zhasil ji. Nerozsvěcet, řekl temný hlas. To jsem já. Aha, řekl jsem, a co byste chtěl? Já se vás jdu zeptat, řekl temný hlas, co je s těmi básněmi.

Človíčku, povídám - to jsem ještě pořád nevěděl, oč jde - , teď přece nejsou redakční hodiny. Přijďte si zítra v jedenáct. A vy mě dáte sebrat, řekl hlas trpce. To nejde. Proč už netisknete mé básně?

Nur nun mi divenis, ke li estas nia ŝtelisto. Tio estus longa ĉapitro, mi diris al li. Sidiĝu, junulo. Kaj se vi volas tion scii, ni ne publikigos viajn poemojn, ĉar ili neniom valoras. Tial.

Mi opiniis, diris la voĉo dolore, ke... ke ili ne estas malpli bonaj ol la unuaj. La unua estis kontentiga, mi diris severe. En ĝi estis sincera sentimento, ĉu vi komprenas? Ĝi havis intuician freŝon, ĝi havis senperecon kaj forton de la travivaĵo, ĝi havis humoron, ĝi havis ĉion; sed la pluaj, hometo, valoris eĉ ne katan tuson.

Sed, ekveis la voĉo, mi verkis ja ilin same kiel la unuan! Ĝuste tial, mi diris dure: Nur vi ripetiĝis en ili. Denove estis en ili, ke ekstere aŭdeblas paŝoj - Ja mi aŭdis ilin, defendis sin la voĉo. Sinjoro redaktoro, kiam oni ŝtelas, oni devas pintigi la orelojn, kiu plandas ekstere! Kaj denove temis tie pri muso, mi kontinuus. Pri la muso, diris la voĉo senkuraĝe. Sed la muso tie ĉiam estas! Kaj mi skribis pri ĝi nur en tri - Konkize, mi interrompis lin, viaj versoj iĝis aĉa literatura rutino. Sen originaleco, sen inspiro, sen sentimentala renesanco. Amiketo, tiel ne estas eble. Poeto ne darfus ripetiĝi.

La voĉo momenton silentis. Sinjoro redaktoro, ĝi diris post tempeto, tio estas ĉiam la sama! Provu ŝteli, unu ŝtelo egalas al la alia. Estas malfacila afero. Estas, mi diris. Vi devus spili alian barelon. Eble mi povus elŝteli preĝejon, proponis la voĉo. Aŭ tombejon. Mi kapbalancis energie. Tio estas senrezulta, mi diras al li. Homo, ne gravas tiom la temo, kiom la travivaĵo. En viaj versoj mankas al mi ia konflikto. Ripetiĝas nur ekstera priskribo de ordinara ŝtelo - Vi devus malkovri ian pli internan motivon. Ekzemple la konsciencon.

La voĉo tempeton meditis. Vi opinias ion kiel konscienciproĉojn? li diris hezite. Ĉu vi pensas, ke la poemoj estos poste pli bonaj? Memkomprene, mi vokis. Amiko, ĝuste ĉi tio donos al ili psikologian profundon kaj agitiĝon. Mi provos tion; diris la voĉo enpense. Nur mi ne scias, ĉu kun tio mi povos ŝteli. Oni perdas la certecon, ĉu vi scias? Kaj se mankas la certecon, oni estas pli facile kaptetbla.

Ted' teprve jsem se dovtípil, že to je náš zloděj. To by byla dlouhá kapitola, řekl jsem mu. Sedněte si, mládenče. A když to chcete vědět, já ty vaše básně netisknu, protože za nic nestojí. Tak.

Já myslel, řekl hlas bolestně, že... že nejsou horší nežli ta první. Ta první ušla, pravil jsem přísně. Byl v ní upřímný cit, rozumíte? Mělo to intuitivní svěžest, mělo to takovou bezprostřednost a sílu prožití, mělo to náladu, mělo to všechno; ale ty další, člověče, byly pro kočku.

Ale dyť, zaúpěl hlas, dyť já je psal stejně jako tu první! To je právě to, řekl jsem tvrdě. Vy jste se v nich jenom opakoval. Zase v nich bylo, že venku slyšíte kroky – Dyť já je slyšel, bránil se hlas. Pane redaktore, když jeden krade, tak musí špicovat uši, kdo to venku šlape! A zase v nich bylo o té myši, pokračoval jsem. Vo tej myši, pravil hlas malomyslně. Když tam ta myš dycky je! Ale já vo ní psal jenom ve třech - Zkrátka, přerušil jsem ho, z vašich veršů se stala pustá literární rutina. Bez originality, bez inspirace, bez citové obnovy. Přítelíčku, to nejde. Básník se nesmí opakovat.

Hlas chvilku mlčel. Pane redaktore, řekl po chvíli, když vono to je pořád stejný! Zkuste to krást, vona je jedna krádež jako druhá. To je těžká věc. Je, řekl jsem. Měl byste začít z jiného soudku. Snad abych vykradl kostel, navrhoval hlas. Nebo krchov. Potřásl jsem energicky hlavou. To nikam nevede, povídám. Člověče, na látce tak nezáleží jako na prožití. Ve vašich verších mně chybí nějaký konflikt. Je to pořád jen takový vnějškový popis obyčejné krádeže - Vy byste měl objevit nějaký niternější motiv. Například svědomí.

Hlas chvilku přemýšlel. To jako myslíte výčitky svědomí? řekl váhavě. Myslíte, že ty básně pak budou lepší? To se rozumí, zvolal jsem. Kamaráde, to jim teprve dá tu psychologickou hloubku a zjitřenost! Já to zkusím, pravil hlas zamyšleně. Já jenom nevím, esli s tím budu moct krást. Člověk ztratí tu jistotu, víte? A když nemá tu jistotu, tak ho spíš čapnou.

Kaj eĉ se! mi ekkriis. Homo ora, ĉu gravas, se oni kaptus vin! Ĉu vi scias imagi, kiajn poemojn vi verkus in carcere et catenis? Mi montrus al vi unu poemon el karcerero, vi okulegus!

Kaj ĉu ĝi estis enpresita en ĵurnaloj? demandis la voĉo avide. Hometo, mi diras, ĝi estas unu el la plej gloraj poemoj en la mondo. Eklumigu, mi tralegos ĝin al vi. Mia gasto fajrigis alumeton kaj eklumigis la lampon. Montriĝis, ke li estas pala, iom aknoza junulo, kiel jam ŝtelistoj kaj poetoj estas. Atendu, mi diras, tuj mi trovos ĝin por vi. Kaj mi elserĉis tradukon de Balado el karcerero en Reading de Wilde. Nome, tiam la poemo estis en modo. Neniam en mia vivo mi deklamis ion kun tia sento, kiel tiam la baladon, sciu, tiujn versojn. Tiel ĉiu mortigas, kiel scias -

Mia vizitanto ne okullasis min; kaj kiam temis tie pri viro iranta al pendumilo, li kovris al si la vizaĝon kaj plorsingultis. Kiam mi finlegis, estis silente. Mi ne volis ĝeni siaspecan grandecon de la momento. Mi malfermis fenestron kaj diris: La plej mallonga vojo kondukas tie trans la barilon. Bonan nokton. - Kaj mi estingis la lampon. Bonan nokton, diris la tremanta voĉo en la mallumo, mi provos tion. Respektan dankon. - Poste li silente malaperis, kiel vesperto; tamen nur li estis lerta ŝtelisto.

Post du tagoj oni kaptis lin en iu butiko, kien li enrompiĝis. Li sidis tie ĉe vendotablo super peco da papero kaj mordis krajon-ekstremaĵon. Sur la papero estis skribite nur: Ĉiu ŝtelas, kiel scias - kaj nenio plu: plej versimile ĝi devis esti varianto pri la Balado el karcerero en Reading.

Tiam la ŝtelisto estis kondamnita al unu jaro kaj duono en karceron pro aro da enrompiĝoj. Post kelkaj monatoj oni enmanigis al mi tutan kajeron de poemoj fare de li. Ĝi estis terura: nura humida subtera ĉelo, kazematoj, kradoj, tintegantaj katenoj surpiede, ŝima pano, vojo al pendumilo kaj multo alia; vere mi konsterniĝis, kiaj teruraj cirkonstancoj devas regi en la koncerna karcerero.

A kdyby! křikl jsem. Člověče zlatá, co na tom, kdyby vás chytli! Copak si nedovedete představit, jaké básně byste psal in carcere et catenis? Já bych vám ukázal jednu báseň z vězení, to byste mrkal!

A byla v novinách? ptal se hlas dychtivě. Holenku, povídám, to je jedna z nejslavnějších básní na světě. Rozsvěťte, já vám ji přečtu. Můj host rozškrtl sirku a rozsvítil lampu. Ukázalo se, že je to bledý, trochu uhrovitý mládenec, jak už zloději a básníci bývají. Tak počkejte, já řku, hned vám to najdu. A vyhrabal jsem překlad Wildovy Balady ze žaláře v Readingu. Víte, tehdy to bylo v módě. Jakživ jsem nepřednášel nic s takovým citem jako tehdy tu baladu, víte, ty verše: Tak každý zabijí, jak dovede -

Můj návštěvník ze mne nespouštěl oka; a když tam bylo o tom muži, jak jde na šibenici, zakryl si tváře a vzlykal. Když jsem dočetl, bylo ticho. Nechtěl jsem kazit jistou velikost té chvíle. Otevřel jsem okno a řekl jsem: Nejkratší cestu máte tamhle přes plot. Dobrou noc. - A zhasil jsem lampu. Dobrou noc, děl rozechvělý hlas potmě, tak já to tak nějak zkusím. Děkuju uctivě. Potom zmizel tiše, jako netopýr; byl to přece jenom šikovný zloděj.

Za dva dny ho chytli v jednom krámě, do kterého se vloupal. Seděl tam u pultu nad kusem papíru a kousal koneček tužky. Na tom papíře bylo jen napsáno: Každěj krade jak dovede - a dál nic; nejspíš to měla být variace na Baladu ze žaláře v Readingu.

Tehdy ten zloděj dostal půldruhého roku kriminálu za řadu vloupání. Za nějaký měsíc mně od něho doručili celý sešit básní. Bylo to strašné: samá vlhká podzemní kobka, kasematy, mříže, řinčící okovy na nohou, ztuchlý chléb, cesta k šibenici a kdesi cosi; já jsem se až zhroutil, jaké děsné poměry musí panovat v dotyčném kriminále.

Vi scias, ĵurnalisto penetras ĉien; kaj mi atingis, ke direktoro de la karcero invitis min al trarigardo de sia instituto. Ĝi estis tute bona, humana kaj duonnova karcero; kaj tiun mian ŝteliston mi trafis ĝuste en momento, kiam li estis formanganta lenton el ladpoto.

Nu, mi diras al li, kie vi havas la tintegantajn katenojn, pri kiuj vi skribis? Nia ŝtelisto ekruĝis kaj ekrigardis senkonsile la direktoron. Sinjoro redaktoro, li balbutis, pri tio, kio ĉi tie estas, oni ne povas ja verki poemojn! Ĝi estas malfacila afero, nu jes.

Kaj ĉu vi estas kontenta? mi demandis lin. Entute mi estus, li murmuris embarase. Sed estas ĉi tie nenio, pri kio mi povus skribi. Depost tiu tempo mi ne renkontis lin. Nek en rubriko El Juĝeja Halo nek en poezio."

Prosím vás, takový novinář vlezte všude; tak jsem si vymohl, že mě ředitel té trestnice pozval na prohlídku svého ústavu. On vám to byl docela slušný, humánní a zánovní kriminál; a toho svého zloděje jsem zastihl, zrovna když vyjídal z plecháče čočku.

Tak co, povídám mu, kdepak máte ty řinčící okovy, co jste o nich psal? Náš zloděj se začervenal a koukl bezradně na ředitele. Pane redaktore, koktal, dyť vo tom, co tu je, se nedají psát žádný básně! To je těžká věc, že jo.

A jste spokojen? ptám se ho. Jináč bych byl, bručel rozpačitě. Ale není tu vo čem psát. Od té doby jsem se s ním nesešel. Ani v rubrice Ze soudní síně, ani v poezii."